# Esperanto-Numismatika Asocio



**Esperanta Numismatiko** 2017 **Jarkolekto 4 - Numero 4**




# E N H A V O T A B E L O

***de oktobro 2017***

Titolpaĝo ………………………………………………...…………... 1

Enhavotabelo ………………………………………………………… 2

De ni por … ni ! …………………………………………………..... 3

Moneroj & medaloj …………………………………………………. 5

*Jubilea Baltia Esperanto-Tendaro*

*23a Baltia Esperanto-Tendaro*

*65a SAT-kongreso 1992*

*100-jara Esperanto-jubileo 1887-1987*

*20-jara jubileo de Esperanto-grupo en Minsk*

Spikumaĵoj & suplementoj: Kroata plaketo 1997 ……………….. 10

Por spuremuloj ! …………………………………………..…. 12

Medalisto: 7. Jiři Harcuba (1928-2013) ……………………………. 13

Aspektoj de numismatiko: emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj?..…. 14

Historiaj aspektoj: Internacia Helpa Mono ……………………..….. 17

Terminaro: alfabeta listo (11) …………………………………….... 18

El la gazetaro: forpasis M. Boulton (1924-2017) ………………….. 19

Retpoŝto ………………………………………………………….. 20

Anoncoj & eventoj ………………………………………..……. 36

Tajpado & paĝaranĝo: Vivienne Tudts bert.boon@skynet.be

Provlegado: Jozefo Horvath www.esperanto.es/biblioteko

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon! www.kolektado.esperanto.cc

Finredaktoro: Bert Boon

# *De ni por …ni!*


Karaj membroj kaj legantoj!

Trista tasko nepras unuavice. Kun granda malĝojo ni devas anonci la forpason de du karmemoraj samideaninoj. Forlasis nin en respektinda aĝo nia ENA-membro Cecile Deprez el Ostendo (Belgio) kaj nia eminentulino Marjorie Boulton el Britio. Sincere ni kondolencas la familiojn kaj la geparencojn de ambaŭ esperantistinoj. Nepre vidu tiurilate ankaŭ la konversacion inter ENA kaj UEA en Retpoŝto!


Tamen ni ankaŭ ĝojas pro la emisio de arĝenta pagomedalo de 100 steloj laŭ iniciativo kaj parte ankaŭ kreado de nia membro el Aŭstrio, Walter Klag. En la unua numero de la kvina jarkolekto ni profunde kaj detale priskribos kaj montros tiun novan perlon por la numismatika krono de Esperantujo. Gratulon, Walter!

Ĉinumero estas la lasta de la kvara jarkolekto, do endas montri al vi la varbokoncernajn rezultojn de 2017.

Jen la statistikoj pri la kresko de la membraro de ENA ĝis la fino de septembro 2017:




Tabelo pri laŭlanda nombro de individuaj membroj de ENA




Listo de laŭlanda nombro de universitatoj,bibliotekoj, muzeoj kaj aliaj esperantaj asocioj

Unuafoje ni aldonas ĉi-jare **liston de asocioj**, kiuj laŭpete regule ricevas nian revuon:

- Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj/ Vieno (Aŭstrio)
- Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet /Kortrijk (Belgio)
- Biblioteko Montagu C. Butler /Stoke-on-Trent (Britio)
- Esperanto-muzeo / Svitavy (Ĉeĥio)
- Germana Esperanto-Biblioteko / Aalen (Germanio)
- Interkultura Centro Herzberg / Herzberg am Harz (Germanio)
- Fritz-Hüser-Instituto / Dortmund (Germanio)
- Esperanto-Muzeo / Subirats (Hispanio)
- Biblioteko Juan Régulo Pérez / Madrid (Hispanio)
- Esperanto-Biblioteko "Ramon Molera Pedrals" / Moià (Hispanio)
- Biblioteko de Japana Esperanto-Instituto / Tokio (Japanio)
- Dokumenta Esperanto-Centro / Đurđevac (Kroatio)
- Biblioteko Hector Hodler de UEA / Roterdamo (Nederlando)
- Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco / Samarkand (Uzbekio)
- Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio)
- KEK / Kavumu (Afriko)
- UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) / Budapest (Hungario)
- FEL (Flandra Esperanto-Ligo) /Antverpeno (Belgio)
- Numismatika Fakultato de Viena Universitato / Vieno (Aŭstrio)

Do, la nombro de individuaj membroj dum unu jaro kreskis de 50 ĝis 82, la nombro de asociaj membroj de 16 ĝis 19! Multan dankon do al ĉiuj, kiuj iel kontribuis al la kresko de nia asocio aŭ subtenis nian fakgrupon alimaniere. Via de ENA tre ŝatata kunlaboro estas kaj restu la firma bazo de nia estonta agado! Bonvolu entuziasme daŭrigi vian liberan kunlaboron!

*Ĉar vi ricevos la unuan numeron de la kvina jarkolekto nur je la fino de januaro 2018, ni jam nun deziras al vi, karaj membroj kaj legantoj, ĉion bonan por la venonta jaro. Malgraŭ la danĝera internacia situacio kaj diversaj katastrofoj kaj tragedioj, ENA deziras, ke vi ĉiuj trovu en via familia rondo kaj ĉe viaj tutmondaj geamikoj la agrablan etoson, sen kiu neniu sentas sin vere feliĉa. Prosperan kaj pacan novan jaron! Kiel kutime, viaj mesaĝoj estos ege bonvenaj!*

Bert

# *M O N E R O J & M E D A L O J*

## D1 Unuflankaj medaloj

Jubilea Baltia Esperanto-Tendaro




Lando: Litovio

Materialo: argilo

Konturoj: 104 x 88 mm

Jaro: 1983

Kvanto: nekonata

Pezo: 85 g

Medalisto: nekonata

### *Averso:*

Granda "20" sur foliaro kaj ĉirkaŭa skribo:

"JUBILEA BALTIA ESPERANTO TENDARO 1983 KAUNAS"

### *Rimarko1:*

Okaze de la 20a Baltia Esperanto-Tendaro en Kaunas.

### *Rimarko 2:*

Kaunas estas la due plej granda urbo de Litovio.



## D1 Unuflankaj medaloj

23a Baltia Esperanto-Tendaro




Lando: Litovio

Materialo: argilo

Diametro: 75 mm

Jaro: 1986

Kvanto: nekonata

Pezo: 35 g

Medalisto: nekonata

### *Averso:*

Centre inter spikoj: du manoj liberigantaj blankan kolombon, simbolo de paco.

Ĉirkaŭe: "Smalininkai Litovio 1986 23-a BET"

### *Rimarko1:*

Okaze de 23a BET (= Baltia Esperanto-Tendaro)

### *Rimarko 2:*

Smalininkai: urbeto sur la dekstra bordo de la rivero Nemunas. Iama parto de germana orienta Prusio sub la nomo "Schmalleningken". Inter 1923 kaj 1939 kaj ekde la dua mondmilito litova urbeto.



## D1 Unuflankaj medaloj

65a SAT-kongreso 1992




Lando: Litovio

Materialo: argilo

Diametro: 86 mm

Jaro: 1992

Kvanto: nekonata

Pezo: 70 g

Medalisto: nekonata

### *Averso:*

Surskribo: “65 KONGRESO de SAT LITOVIO · 1992”
Super la litero A trueto, inter la kruroj de la sama litero: steleto

### *Rimarko 1:*

SAT = SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (UEA-fakgrupo)

### *Rimarko 2:*

Vendita dum la kongreso

### *Rimarko 3:*

Kaunas: vidu rimarkon du, paĝon kvar en ĉinumero

## A 1 Esperanto-medaloj

100-jara Esperanto-jubileo 1887-1987







Lando: Litovio

Materialo: argilo

Diametro: 76 mm

Jaro: 1987

Kvanto: nekonata

Pezo: 70 g

Medalisto: nekonata

### *Averso:*

Centra bildo kun Esperanto-stelo. El ĉiu petalo (kontinento) mano montras al steleto en la mezo.

Ĉirkaŭ tio surskribo: "INTERNACIA LINGVO ESPERANTO 100  1887-1987".
Trueto kun ŝnureto.

### *Reverso:*

Sigelo de la "Panevejisa klubo ESPERO" (litove: Panevėžys).




### *Rimarko 1:*

Temas pri duflanka medalo, kies aversa bildo provizore mankas en nia arkivo. Ĉu vi povus helpi? Dankon!

### *Rimarko 2:*

Panevejiso estas la kvine plej granda urbo de Litovio.

## D 1 Unuflankaj medaloj

20-jara jubileo de Esperanto-grupo en Minsk




Lando: Belorusio

Materialo: argilo

Diametro: 85 mm

Jaro: nekonata

Kvanto: nekonata

Pezo: 30 g

Medalisto: nekonata

### *Averso:*


Konturo de klasika templo. Super ĝi bruna cirklo (diametro 23mm) kun verda steleto. La meza bildo ŝajne troviĝas en la centro de perspektive montrata absido.
Supre: skribo, interrompita per trueto: “20 JARA ° JUBILEO”.
Sube: “MINSK”.

### *Rimarko 1:*

Emisiita okaze de la 20-jara jubileo de (al ni nekonata) Esperanto-klubo en Minsk.

### *Rimarko 2:*

Minsk estas la ĉefurbo de Belorusio.



## *S P I K U M A Ĵ O J   K A J   S U P L E M E N T O J*

# Plaketo de la unua kongreso de kroataj esperantistoj 1997




Lando: Kroatio

Metalo: kupronikelo (?)

Diametro: 188 mm

Diko: 0,7 cm

Kvanto: nekonata

Pezo: 410 g

Dato: 16.10.1997

Medalisto: Damir Matačić

## *Averso:*

Ekstera cirklo: surskribo “UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ”. Sub la jarindiko: kuŝanta rombo, simila al la romboj en la kongresa emblemo. Interna cirklo: “PRVI KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA 1997”. En la kartuŝo la kongresemblemo.

## *Rimarko 1:*

La kroata registaro omaĝis la okazigon de la unua kongreso de la kroata Esperanto-movado per eldono de memorigaj poŝtmarkoj, monero por ĝenerala cirkulado kaj plaketo.

## *Rimarko 2:*



Priskribo: jarkolekto 3, numero 4

La plaketo estas 12-pinta poligono.

## *Rimarko 3:*

La kroata vorto “kuna” signifas marteson kaj ĝi referencas al mezepoka kutimo uzi martesfelojn kiel pagilon. La valorindiko “kuna” anstataŭigas la ekskomunistan dinaron de la iama Jugoslavio de Tito.

# KROATA MONERO DE 25 KUNAOJ

En 1997, okaze de la unua kongreso de kroataj esperantistoj (aranĝita la 31an de majo kaj la unuan de junio en Zagrebo), Kroata Nacia Banko (Hrvatska narodna banka) eldonis specialan porokazan moneron de 25 kunaoj kun dulingvaj (kroata kaj esperanta) tekstoj. Temas pri monero, kiu ekde la 24a de junio 1997 ĝis nun estas valida cirkulanta mono.

La monero havas diametron de 32 milimetroj, formon de 12-pinta poligono kaj pezon de 12,75 gramoj. Estis eldonitaj entute 300.000 ekzempleroj, kaj la ĉefan meriton por ĝia eldono havis la membro de Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj Dalibor Brozović (1927-2009), konata kroata lingvisto, tiuperioda politikisto (vicprezidanto de Kroatio en 1990) kaj direktoro de Kroata Leksikografia Instituto (ĝis 1991). Brozović estis esperantisto ekde 1946, fama interlingvisto kaj esperantologo, ekde 1992 prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo (kiu organizis la unuan kongreson de kroataj esperantistoj), membro de Honora Patrona Komitato de UEA, prezidanto de la LKK de la 86a UK en Zagrebo ktp. Samtempe kun la monero, li entreprenis kaj realigis la eldonon de kroataj esperantaj poŝtmarkoj: la unuan en 1997, okaze de la unua kongreso de kroataj esperantistoj, kaj la duan en 2001, okaze de la 86a Universala Kongreso de Esperanto.

La centra parto de la 25-kunaa monero estis produktita el alojo konsistanta el 92 % da kupro, 6 % da aluminio kaj 2 % da nikelo, dum la ekstera ringo konsistas el 75 % da kupro kaj 25 % da nikelo. Ĝi estis produktita en la kroata monfarejo (Hrvatski novčarski zavod; http://www.hnz.hr/) en Zagrebo, en kies retejo troviĝas mallonga priskribo de la monero, same kiel en la retejo de Kroata Nacia Banko:
https://www.hnb.hr/-/25-kuna-prvi-kongres-hrvatskih-esperantista.

Aŭtoro de la monero estas la renoma kroata akademia skulptisto kaj medalisto Damir Mataušić (1954) el Zagrebo (www.matausic.net).

Kvankam la 25-kunaa monero estas oficiala cirkulanta mono de Kroatio, en la cirkulado ĝi malofte aperas, ĉar krom ĝia ĝenerala valoro, ĝi havas multe pli grandan numismatikan valoron. Jam delonge ne eblas havigi ĝin al si krom en aŭkcioj, kie ĝi atingas multe pli altan prezon ol estas ĝia reala valoro.

La eldonon de la monero difinis la konsilantaro de Nacia Banko de Kroatio per la *Decido pri bazaj karakterizaĵoj de la porokaza cirkulanta monero de 25 kunaoj "Unua kongreso de kroataj esperantistoj"* (kroatlinge: Odluka o osnovnim obilježjima prigodnog optjecajnog novca od 25 kuna "Prvi kongres hrvatskih esperantista"), aperinta en Narodne novine, la oficiala gazeto de Respubliko Kroatio, numero 58 de la naŭa de junio 1997, kaj per la posta *Decido pri cirkuligo*, aperinta en la numero 60 de la 11a de junio 1997. Tiujn decidojn subskribis la tiama prezidanto de la konsilantaro de Nacia Banko de Kroatio, d-ro Marko Škreb.







Dalibor Brozović (1927-2009) Damir Mataušić (1954)

*Verkis: Josip Pleadin, gvidanto de Dokumenta Esperanto-Centro, Đurđevac (Kroatio)*

# *P O R   S P U R E M U L O J !*


*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*
*Tial ni kreis tute novan rubrikon "POR SPUREMULOJ". Multaj kapoj scias pli ol nur unu, kaj multaj okuloj vidas kaj legas pli ol nur unu okulparo. Do ni petas vin atenti kaj dise rigardi, eĉ demandi kaj spuri, kiel kutimis Hercule Poirot aŭ Sherlock Holmes…*
*Eternaj omaĝo kaj famo estos via rekompenco! Ni anticipe dankas vin ĉiujn!*

## Jam kelkaj informoj pri la unua enigmaĵo de ĉi rubriko!

*Vidu ankaŭ jarkolekton tri,n-ro unu*



Jen fotoj de enigma bronza medalo kaj de poŝtkarto, kiuj ambaŭ montras samaspektan plaketon kun busto de Zamenhof, kreita en **1909** de la germana skulptisto Friedrich Moritz Brodauf (1872-1939). Mezuroj provizore mankas. En kiu urbo aŭ vilaĝo ĝi troviĝas/-is ie en Germanio? Ĉu eble ie en la iama Prusio? **Ĝis hodiaŭ la plej malnova Esperanta medalo!** Ni esperas baldaŭ ricevi kromajn informojn de niaj legantoj!





Sendube interesa objekto, kiu **probable esti uzita kiel modelo,** por krei la monerfiguron de la spesmilo-pagmedaloj, de kelkaj stelo-pagmedaloj, medalo el 1909 farita en Dresden, murmedalo far UEA kaj eĉ de arĝenta medalo emisiita en 2009 de Esperanta Civito. Temo por iu estonta numero!

*Por ĉi tiu rubriko via helpo estas senĉese petata. Antaŭdankon!*

# *M E D A L I S T O J*

## 7.Jiří HARCUBA (1928 – 2013)





**Jiří HARCUBA** (naskiĝis la 6an de decembro1928 en Harrachov, mortis la 26 an de julio2013) estis ĉeĥa vitristo, skulptisto kaj esperantisto.

Unue li lernis tajli vitron (1942-1945) en Harrachov, poste li studis en Ŝtata Faka Vitrista Lernejo en Nový Bor (1945-1948), ĉe la pedagogia fakultato de la universitato en Olomouc (1948), tri jarojn li praktikis vitrotajladon en la entrepreno “Artisma Vitro” en Nový Bor kaj finis siajn studojn ĉe Art-industria Altlernejo en Prago (1949-1957).

Li kreis monerojn kaj medalojn, krome vitrajn reliefojn (vitrogravuraĵojn) kun portretoj de famaj artistoj, sciencistoj, politikistoj (i.a. Komenio, Albert Einstein, Franz Kafka, Antonín Dvořák). Ampleksa estas ankaŭ lia medalista verkaro, dum kiu li uzis teknikon de vitrografio. Li faris projektojn de centoj da medaloj kaj moneroj. En Ĉeĥio ĉiu loĝanto konas lian 5-kronan moneron. Ekde 1976 li estis membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Por esperantistoj li proponis la renovigon de la Esperanto-monumento en Františkovy Lázně, sed pro manko de financoj la projekto ne efektiviĝis (AEH tie metis memortabulon pri la malnova monumento detruita de la nazioj). Lia verkaro estis koncize prezentita en Esperanto-Muzeo en Svitavy kadre de la ekspozicio *Esperanto kaj muzoj*, okazinta ekde junio 2013 ĝis majo 2014.

Jiří Harcuba estis alte aprezata en sia fako en la tuta mondo, ofte li estis invitata prelegi ĉe altlernejoj kaj universitatoj aŭ krei portretojn de famuloj.

*La redakcio kore dankas s-inon Jarmila Rýznarová.*

## *A S P E K T O J   D E   N U M I S M A T I K O*

# Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj?

## A. Cirkonstancoj saĝon alportas

En la rubriko "Anoncoj & eventoj" en la antaŭa numero (jarkolekto kvar, numero tri) ni publikigis i.a. anoncon de revuo "Monato" pri aŭkcio de rara ora 25-stela medalo de 1965. Baza prezo: 2 500 eŭrojn. Fino la de aŭkcio: la 1an de septembro 2017. Plej alta propono: 3.200 eŭrojn! Ĉu tia prezo estas tro alta aŭ tro malalta? Respondo dependas de diversaj faktoroj, kiel stato de la objekto (vidu jarkolekton unu, numero kvar, p. dek), eldonkvanto, materialo (oro, arĝento ktp.), la salajro de skulptisto, medalisto k.a. Kia prezo do estus ĝusta? Neniu, ĉar ĉio dependas unuavice de la intereso kaj aĉetpovo de la aĉetonto. Laŭ proverbo la valoro de artefakto dependas de "kiom volas elspezi frenezulo"!

Ĉu emisii novan medalon estas blindiga aventuro aŭ kalkulebla risko? Se oni ne konsideras la eblecon uzi mendilon kaj antaŭpagon, grava risko estas neevitebla.

Krome, diversaj situacioj kaj eventoj en la historio povas influi la eblecojn. Dum militoj metaloj de publikaj monumentoj, sonoriloj de preĝejoj ktp. estis laŭleĝe konfiskitaj por fabriki diversspecajn armilojn. Ankaŭ dum epokoj de ekonomia regresado metaloj estas ege multekostaj kaj apenaŭ haveblaj por privataj personoj aŭ malriĉaj asocietoj. Tio ankaŭ estis la kazo en Orienta Eŭropo dum la t.n. komunista epoko.

Tial oni ofte rezignis kaj ne mendis medalojn; malbonaj epokoj do, ankaŭ por gravuristoj, medalistoj kaj … kolektantoj! Tamen, en kriza situacio homoj ofte estas eltrovemaj. Estis oftege uzata ekzemple argilo por krei terakotajn memoraĵojn. Pri tiaj medaloj temas la ĉi-numera rubriko "Moneroj & medaloj", kaj ankaŭ en la unua numero de la kvina jarkolekto ni priskribos aliajn tiaĵojn.

## B. Sufiĉe ĉipa solvo

Ekzemplon de eksterordinara alternativo por  malpli riĉa esperanto-klubo montris kuraĝa esperanto-grupo el la urbo Pardubice en Ĉeĥio, fondita en 1909 kaj ankoraŭ aktiva. Lerta membro mem kreis manfabrikitajn memoraĵojn en diversaj metaloj, kiel kupro kaj aluminio. Probable li uzis metalrestaĵojn, skizis la ilustraĵon kaj per gravurilo kreis surtekstojn por tiuj unikaĵoj.

Ni nun prezentas du al ni konatajn ekzemplerojn, preparitajn, gravuritajn, ellaboritajn kaj definitivigitajn propramane. Do, ĉiu el ili estas rara memormedalo por honori kursanojn, kiuj sukcese finis la kluban kurson. La kupran version mi povis aĉeti, la aluminian donace sendis al mi Jarmila Rýznarová, aktivulino de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj (AEH, ekde 1991) kaj ĉefredaktorino de "Informilo de EH". Ambaŭ estas unuflankaj medaloj.

1 2







1 Lando: Ĉeĥio

Kvanto: nekonata

Metalo: kupro

Pezo: 169,36 g

Diametro: 96 mm

Medalisto:ekskursano

Jaro: ĉirkaŭ 1960

Diko: 2 mm

### *Averso:*

Supre: pejzaĝa silueto de burgo Kunětická hora, inter Pardubice kaj Hradec Králové
Meze: Esperanto-stelo kun majusklo E
Sube: ESPERANTO-PARDUBICE

### *Rimarko 1*

Post polurado kaj gravurado la loka artisto protektis la surfacon kontraŭ erozio per unu aŭ pliaj tavoletoj da verniso.

### *Rimarko 2*

La trueto montras la eblecon pendigi aŭ surhavi per ŝnureto la medalon.

### *Rimarko 3*

Por la gravurado tre verŝajne estis uzita akra ĉizilo aŭ grifelo.

### *Rimarko 4*

La medalo estas iomete konkava (vidu la rubrikon “Terminaro” en la antaŭa numero).

2 Lando: Ĉeĥio

Kvanto: nekonata

Metalo: aluminio

Pezo: 17,95 g

Diametro: 107 mm

Medalisto: ekskursano

Jaro: nekonata

Diko: 0,50 mm

### *Averso:*

Vidu la kupran medalon.

### *Rimarko 1*

Ankaŭ ĉimedalon la kreinto ŝirmis, verŝajne per nur unu tavoleto de nigra farbo. Poste li gravuris per la samaj gravurilo kaj tekniko. La koloro de la gravuro do estas la originala koloro de aluminio.

### *Rimarko 2*

Pri la trueto: vidu rimarkon du de la antaŭa medalo.

### *Rimarko 3*

Gravurilo: vidu rimarkon tri de la antaŭa medalo.




Insigno kreita de la filino de Jarmila

Daŭrigota

# *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*

## Internacia Helpa Mono

### A La valormarkoj de Ernesto Bord kaj Aĥilo Tellini

Je la fino de la jaro 1907 (**do 5 jarojn antaŭ la emisio de la spesmilo-pagmedaloj!)** doktoro Tellini (Bolonjo/Italio) kaj profesoro Bord (Diĵono/Francio) kreis kune "Internacian Helpan Monon" por faciligi la transsendon de etaj sumoj. Ili vendis valormarkojn de 2 spesdekoj (aŭ 20 centonoj de franko aŭ liro) kaj evidente akceptis la markojn je la sama valoro.

La (dentumitaj) markoj estis faritaj en diversaj koloroj: viola, verda, ruĝa, ora, griza, flava, bruna kaj blua.*(fig. 1)*







*fig.1* *fig.2*

Raraj estas la sendentaj ekzempleroj, nigrakoloraj kaj presitaj sur maldika flava papero. *(fig.2)*

Ĉiuj markoj montras Esperanto-flagon sur la norda parto de la terglobo. Surskriboj: "PER kaj POR ESPERANTO 1907" – "INTERNACIA HELPA MONO" – "2 SPESDEKOJ 5 CENTIMOJ". La rando de la bildo montras tipan (tiam tre ŝatatan) ornamaĵon en stilo de Nova Arto (Art Nouveau / Jugendstil).

La bildoj, kiujn ni danke ricevis de nia numismatika pioniro kaj membro Hans Janskowski, sufiĉe bone montras la aspekton, tamen ne estas tute perfektaj (en la tria figuro pro kopiado malaperis la dentumo), pro kio ni petas pardonon.




La valormarkoj de Bord kaj Tellini domaĝe ne longtempe funkciis. La eldono ja estis kontraŭleĝa kaj malpermesita. Tial ili donis la stokon al Universala Esperanto-Asocio (ekde 1908). La markoj sekve estis vendataj kun surpreso "U.E.A.", por funkcii kiel glumarkoj aŭ sigeliloj. Malgraŭ tiu malsukceso aliaj valormarkoj estis lanĉotaj.

Daŭrigota

# *T E R M I N A R O*

## *Alfabeta listo (11)*

**fono:** *la plej malsupra nivelo sur monero, kiu havas monerfiguron kun suprenira reliefo.*

**frotpregilo:** *pregmaŝino propulsata per frotado. Frotpregiloj por moneroj kaj medaloj devenis de la ŝraŭbpremilo. La balanciera brako estis anstataŭigita per horizontala balancdisko, kiu estas propulsata pere de du vertikalaj diskoj. Aktuale la frotpregilo estas ĉefe uzata por grandaj medaloj kaj por fabriki stampojn.*

**galvanizaĵo:** *kopio de objekto (monero, medalo aŭ aliaĵo), rezulto de galvanoplasta procedo (elektrolizo). Ĉar kupro, arĝento kaj oro senpene estas deponeblaj kiel surfaca tavolo, eblas fari precizajn kopiojn de kupraj, arĝentaj kaj oraj numismatikaĵoj, ekzemple por muzeoj, kiuj volas vendi belegajn kopiojn je reduktita prezo. Tiaj objektoj tute ne estas falsaĵoj. Oni tuj rimarkas, ke sur la rando troviĝas lutjunto.Krome ne eblas kopii randskribon aŭ randornamaĵojn en galvanizaĵo. La kopioj ne havas saman sonon kiel la originalaj artaĵoj dum kontakto kun ekzemple marmora plato. Ankaŭ la koloroj tre malofte estas tute malsamaj.*

**inkusa (monero):** *karakterizo de negativa aŭ kava bildo ĉu averse, ĉu reverse. Tiajn monerojn celkonscie emisiis deko da grekaj urboj el Grand-Grekujo (Suda Italio)en la sesa kaj lakvina jarcentoj antaŭ nia erao. Por la averso oni uzis normalan negativan stampon por krei pozitivan bildon, por la reverso pozitivan por krei negativan bildon.*
*Tiaj moneroj ankaŭ akcidente estiĝas, kiam finfabrikita monero restas hazarde en la reversa stampilo. Se inter la stampoj estas metata nova metaldisketo, la restinta monero pregas negativan bildon en la sekvontan ekzempleron.*

**legitima medalo:** *legitimilo i.a. por policistoj, informservoj, ĵurnalistoj, medicinistoj ktp. Ekzemple en Nederlando la informservoj ĉirkaŭ 1910 uzis unuflankan bronzan medalon, kopion de arĝenta guldeno de Vilhelmo 1a el 1816. Sur la senbilda reverso troviĝis cifero.*

**maneto:** *parto de moneropregilo, kiu tuj antaŭ la pregado ŝovas metaldisketon inter la stampilojn. Post la stampado la t.n. maneto forigas la moneron el la maŝino.*

**nebriligita:** *malbrile realigitaj partoj de la monerfiguro de monero aŭ medalo. Tiel estiĝas kontrasto inter la poluritaj kaj nepoluritaj partoj. La brila aspekto estas rezulto de polurado per la stampilo. La malbrilo efektiviĝas per sablosprucigo.*

**noĉo:** *sulkaĵo en la rando de monero, perpendikulara al la surfaco.*

**porokaza (monero):** *monero sen statuso de legitima pagilo, nur uzebla dum specialaj okazoj, kiel festo aŭ jubileo. La valorindiko kutime estas fantazia, kvankam kelkaj nacioj permesas uzi la oficialan valorindikon*

# *E L   L A   G A Z E T A R O*

## FORPASIS MARJORIE BOULTON (1924-2017)



La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino Marjorie Boulton.

Marjorie Boulton (naskiĝis la 7an de majo 1924) doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-1962), de la Internacia Ekzameno (1961-1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Deguĉi, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski. Ekster la Esperanto-movado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo.

La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas *Kontralte* (1955), poezio, *Cent ĝojkantoj*, (1957, '77), poemoj, *Virino ĉe landlimo*: drameto kaj skeĉoj (1959), *Eroj kaj aliaj poemoj* (1959), *Zamenhof, Creator of Esperanto* (1960, '80), anglalingva bibliografio, *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (1962), *Dek du piedetoj* (1964), noveloj, *Okuloj*(1967), novelaro, *Nia sango* (1970), teatraĵo, *Rimleteroj* (1976), poemaro kun William Auld; *La verkaro de Julio Baghy* (1983), literatura studo, *Faktoj kaj fantazioj* (1984), prestiĝa legolibro, *Ne nur leteroj de plumamikoj,esperanta literaturo - fenomeno unika* (1984) kaj *Du el* (1985), poemaro kun Poul Thorsen, *Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj* (2005), eseo. En 1999 aperis, sub la redaktado de Vilmos Benczik festlibro: *Lingva Arto,*jubilea libro omaĝe al Wiliam Auld kaj Marjorie Boulton.

En 1985 ŝi estis elektita kiel honora membro de UEA.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 700,2017-08-31

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

***<u>Petletero de ENA al UEA, sendita la unuan de septembro 2017. TAMEN VANE!!! Vidu ankaŭ "Retpoŝto</u>"!***

***Karaj gesamideanoj!***

***Hieraŭ surprize atingis min la trista mesaĝo pri la forpaso de nia plej eminenta verkistino, Marjorie Boulton.***

***Ŝiaj meritoj kiel artistino, esperantistino kaj homo estas tiel grandaj, ke ne dediĉi al ŝi belegan memormedalon kun ŝia bildo(ekzemple averse) kaj verso el poemo (ekzemple reverse), por eterne honori ŝin, estus tute neimageble!***

***Samideane kaj numismate,***

***Bert Boon***
***Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)***
***Ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"***

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

## Reagoj kaj konversacioj

06.07.2017 14:15

Kara amiko kaj kunredaktoro Jozefo!

Jen jam la antaŭlasta numero de 2017. Ĝi aperos je la fino de julio, do tute ne urĝas kaj tiel vi povas pli trankvile (mi supozas!) provlegi ĝin.

Kroma temo: la numismatika terminaro en Esperanto. Ĝis hodiaŭ mi difinas (aŭ neologismas) la terminojn laŭbezone dum la preparado de nova numero. Tamen mi demandas min ĉu eblus labori pli laŭsisteme, ekz. per uzo de PIV aŭ Bildvortaro. Mi nur ne scias KIEL tio estus farebla. Probable, surbaze de via sperto en tiu kampo, vi havas (alternativan) sugeston…

Pro via kunlaboro favore al ENA kaj pro via respondo pri la kroma temo mi tutkore dankas vin kaj deziras al vi kaj via familio agrablajn somerajn feriojn.

Amike kaj numismate,

Bert

12.07.2017 9:17

Kara Bert,

jen la nova numero de la ENA-revuo kun miaj sugestoj.

Pri la temo Numismatika terminaro jen estas miaj sugestoj:

1) Varbi teamon el numismatoj kaj, se eblas, lingvistoj-esperantologoj, kiuj superrigardus la terminojn pri konveneco al la lingvaj reguloj. Ĉi tiu teamo interrilatus per retleteroj aŭ retforumo, laŭokaze en renkontiĝoj.

2) Oni devus kolekti el vortaroj, interreto ktp. la jam ekzistantajn kaj uzatajn terminojn. PIV bedaŭrinde ne havas vinjeton por numismatiko, do priserĉi ĝin oni povus nur per indikaj vortoj (kiel: monero, numismato, medalo ktp.).

3) Oni devus konsistigi liston de terminoj (ekz. el Münzerlexikon) en unu aŭ kelkaj ĉefaj lingvoj.

4) Apud la terminoj oni devus skribi la Esperantan difinon de la nocio. Ĉio ĉi povus okazi en cifereca formato, kiel Walter proponis, ekz. en tabela formo.

5) Surbaze de la difinoj oni povus proponi esperantajn ekvivalentojn, diskuti kaj privoĉi ilin, antaŭ la definitivigo.

6) La terminaro devus havi konstantan retejon, por ebligi aliron al ĝi de la vasta publiko kun la peto, ke oni esprimu opiniojn pri la proponitaj terminoj.

6) La terminaro devus aperi unue kiel e-libro. Poste oni povus presigi ĝin en cifereca tipografiejo en laŭbezona kvanto.

Kun amikaj salutoj: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.07.2017 17:35

Elkoran dankon, kara Bert!

Kie restas mia trinkaĵo?

Salutas Walter Klag

20.07.2017 11:59

Tute ne dankinde, kara Walter, mi dankas vin pro via tuja reago!

Por ke mi povu enmanigi al vi bongustan glason da portugala vino, vi bedaŭrinde devas pacienci ĝis la UK en Lisbono, kiun vizitos mia edzino kaj mi en 2018! Ni esperas fine renkonti vin tiam kaj tie.

Mi sekve post ĉi tiu mesaĝo sendos al vi leteron, kiun responde sendis al mi Jozefo Horvath pri sistema kompilado de numismatika terminaro (pri kio vi mem ankaŭ jam kolektis erojn kaj proponis kunlaboron, ankaŭ de via edzino, ĉu ne?). Bonvolu tralegi liajn konsilojn (li eĉ citas vian nomon) kaj bonvolu sciigi kion vi pensas pri eventuala praktika ellaboro de tia sistemo. Ekzemple kiel kontakti kunlaborantojn por tiu projekto ktp.

Kun amikaj kaj numismataj salutoj!

Bert

06.08.2017 12:00

Kara Bert!

Jen tri fotoj de la nova 100-stela Monero-Ĵetono-Pagomedalo.
Vi estas la unua, kiu ricevas ilin.
Pliajn informojn mi sendos al vi en septembro.
Mi deziras al vi agrablan someron!
Walter

06.08.2017 12:30

Kara amiko Walter!

Kia dimanĉa surprizo! Mi estas preskaŭ "ŝokita" pro la beleco de tiu unua- via pagomedalo! Vere nemalhavebla kolektindaĵo por numismatoj.
Eble mi estas jam tro malpacienca, sed mi volas uzi la oportunecon por senhezite mendi ĉe vi du (2) ekzemplerojn.
Viaj (detalaj) informoj en septembro estos ege bonvenaj por priskribi ĝin laŭkutime en la rubriko "Moneroj & medaloj", en la numero kiu aperos fine de oktobro, uzebla samtempe kiel sciigo kaj kiel reklamo, se vi aldonos informojn pri kiel mendi ĝin. Se vi volas, mi jam povas sendi la unuan ŝuldotan sumon al vi. En tiu kazo mi bezonos viajn bankajn kodojn kaj la numeron de via konto.
Lasu min tutkore kaj entuziasme gratuli vin pro la superba unua rezulto de via projekto! Dankon kara Walter, ankaŭ ke unue vi sendis la fotojn al mi.
Amike kaj numismate,

via Bert

06.08.2017 13:02

Kara Bert!

Dankon pro la letero. Pri la prezo mi decidos en septembro. Ĉar mi estas kelkajn semajnojn eksterlande (ne en Aŭstrio) mi komencos la dissendadon nur en novembro.

Mi redeziras al vi agrablan someron!

Walter

05.09.2017 22:24

Kara Bert!

Saluton el Vieno! Mi esperas, ke por vi la somero estis „granda“ kaj la aŭtuno estos al vi agrabla.

Nun mi preparas informilon kaj mendilon por la 100 Steloj. Mi volas skribi:

| | | |
|---|---|---|
| La nomoj: | René de Saussure | (1868 – 1943) |
| | Julia Isbrücker | (1887 – 1971) |
| | Herbert Höveler | (1859 – 1918) |
| | András Cseh | (1895 – 1979) |
| | Dreves Uitterdijk | (1866 – 1940) |

ĝis nun neniam aperis sur medalo aŭ monero. Ĉu vere?

Numismate via

Walter

29.09.2017 20:37

Kara Walter!

Mi konstatis, ke mi (pro mia aĝo?) ne jam respondis je ĉimesaĝo kaj do sincere petas pardonon. Laŭ mi el la suba listo nur Andreo Cseh aperis sur (esperanta) medalo el Latvio (Vidu jarkolekton 3,n-ron 1, paĝon 6). Ĉu la aliaj sur nacia monero?Eble, mi ne scias!

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.07.2017 17:53

Dankon pro plia numero, s-ro Boon.

Se ne sufiĉus la interesaj donitaĵoj pri medaloj kaj moneroj, kampo fremda al mi, vi aldonas erojn de nia historio, kiel tiu artikolo pri la monumento Františkovy Lázně.

Mi havas plurajn esperantistajn kaj neesperantistajn kartojn (bild- kaj poŝtkartoj estas fako malfremda al mi), kun diversaj anguloj de tiu monumento kaj ĝia historio ĉiam interesas min. Mi ne sciis pri la vandalaj agoj kontraŭ la postmonumentaj E-tabuloj!

Amike bondeziras al vi kuraĝon por multaj pluaj numeroj

James Piton (Brazilo)

20.07.2017 12:12

Kara James! (Bonvolu nomi min Bert, ne sinjoron, mi petas)

Dankon pro via tuja reago. Mi ĝojas, ke la teksto de Jarmila pri la monumento plaĉas al vi. Tio pruvas ke numismatiko vere estas fenestro al aliaj aspektoj de la esperanta kulturo. Numismatiko, kiel arkeologio, estas taŭga helposcienco por la esperanta kaj la ĝenerala homa historio,vere!

Dankon ankaŭ pro viaj bondeziroj koncerne la pasontecon de la ENA-revuo!

Kun koraj kaj numismataj salutoj!

Via Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

20.07.2017 0:17

*Dankon pro la bela revuo!*

*Renato*

20.07.2017   12:02

Kara Renato!

Koran dankon pro via pozitiva reago!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.08.2017   18:56

Mia kara Bert!

Dankon pro la sendo de la lasta EN-o, kiu ĉiam estas tre interesa. Bonega la prezento de diversaj medaloj; surprizis min la ekscio pri la iniciato de s-ro G. Pirlot: neniam mi estis leginta pri tiaĵo! Vere dankinda iniciato, kun nekredebla rezulto rilata al eŭro. En la terminaro legeblis, kiel vi tre bone solvis la tradukproblemojn pri tiel malfacilaj vortoj (mi lernis novan vorton: pregi kaj la uzon de "fidata", koncerne monerojn. Mi tre ŝatas la klarigojn, ĉar per ili mi sukcesas tre bone kompreni la koncernan signifon. Plaĉega la artikolo pri la unua monumento starigita honore al LLZ, en Franzensbad 1914, iel ligita ankaŭ al Triesto, ĉar dum ĝia inaŭguro festparolis Arturo Ghez, unua prezidanto de Triesta Esperanto-Asocio. Lia parolado aperis ankaŭ libreto-forme. Ĉifoje la retpoŝtaĵoj estis tre gravaj, precipe tiu interŝanĝo de informoj inter vi kaj s-ro Klag. Ankaŭ mi ricevis de li la tutan liston de la programitaj steloj - tre subteninda ideo. (…)

Kiel antaŭe dirite, ĝi estis bonega. Vi tamen iomete pli zorgu pri la kompostado! (…)

Plej karajn salutojn al vi.

Elda

05.08.2017   11:44

Kara Bert!

(…) Mia rimarko respegulas mian vidpunkton pri la kunmetado kaj prezento de la artikoloj, do mia persona opinio kiun mi tute ne deziras trudi al aliaj. Kion mi ne ŝatas, ekzemple sur la 12a kaj 18a paĝoj, ĉar tio ĝenas "miajn" okulojn, estas la koloro de la dankaj vortoj al Pleadin respektive Walter Klag. Laŭ mi, pli bone skribi tion nigre, ĉar pli klare videbla, kaj eventuale kursive kaj etkaraktre, kiel vi faris. Por legi trankvile la EN-on, mi ĝin presis - kaj la skribaj partoj verdkoloraj kaj lazuraj estis malfacile legeblaj, almenaŭ por mi.  La kompostado de la parto kie vi prezentas la medalojn kaj koncernajn priskribojn, mi dirus perfekta. Iom lamas la parto dediĉita al la retpoŝtaĵoj. Mi malŝatas la grandajn interspacojn kaj la nerandĝustigon de la tekstoj en la rubriko *Retpoŝto*, kio impresas kiel io malorda. Per la koloro, evidente vi deziras distingi leteron ricevitan de letero sendita, sed denove tio iomete ĝenas (min, kompreneble, pri aliaj mi ne scias!) kaj precipe se mi deziras havi la revuon presitan, malbone

legeblas poste la teksto. Por solvi tion, oni povus uzi diversajn karaktrojn por "letero ricevita" kaj "letero sendita", aŭ simple unu el la du tekstoj estu kursiva. Estas bone, kiel ie vi faris, meti dividigan aŭ apartigan linion, kiuj tre helpas kompreni la "interparoladon" inter la du mesaĝintoj. Estas malfacile, klarigi ĉi ĉion tial mi "ŝtelos" teksteron kaj montros al vi kion mi intencas diri. Plie, ekzemple je paĝo 27a, oni devus priatenti kiel finiĝas la teksto de la mesaĝo, por ke je la komenco de la paĝo 28a ne aperu nur:

***Amike,***

***Bert*** (tio ĉi estetike estas tre malbela)

Por la momento mi finas ĉi tie mian "grumbladon": mi petas, bonvolu ne ofendiĝi pri tio, mi nur deziras ke tiel interesa revuo estu kiel eble plej plaĉa ankaŭ por la okuloj, ne nur pro la enhavo.

Elda

14.08.2017 10:08

Kara Elda,

(…)
Dankon pro viaj detalaj klarigoj koncerne la paĝaranĝon de i.a "Retpoŝto". La aspekto de la retmesaĝoj jam ŝanĝiĝos en la venonta numero. La malapero de koloroj ekde la nova jarkolekto: fine de januaro. Por tio Vivi bezonos iom pli da tempo por povi rearanĝi la tuton, ankaŭ rilate al la dankvortoj. Via propono malfermis niajn okulojn. Tial ni povos fakte plibonigi kaj plibeligi la aspekton de kelkaj eroj. Danke ni brakumas vin tutkore!

Amike kaj numismate,

Viaj Vivi kaj Bert

04.10.2017 20:20

Mia kara Bert!
Pardonu, mi ne povas nun respondi al via mesaĝo, sed tre baldaŭ en ioma trankvileco mi faros.
Jen mi sendas la foton de la(seula UK-) medalo.
Ĝis kiel eble plej baldaŭ! Pardonu ree mian haston!
Amike, via Elda




☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.08.2017 10:39

Estimata Sinjoro Kang,

Mi ricevis de nia kara Elda Doerfler la bildojn pri filatelaĵoj eldonitaj okaze de la ĉi-jara UK en via lando. Mi tre sincere gratulas la LKK-n pro la belegaj kaj altkvalitaj objektoj, kiuj varmigas mian koron de filatelisto.

Aliflanke, mi miras kiel numismato pri la absoluta silento koncerne la plurfoje anoncitan medalon, pri kiu nur la eldonkvanto ne ankoraŭ estus decidita. Ĉu mi mendis du ekzemplerojn de ne ekzistanta medalo aŭ ĉu ĝi aperos post la kongreso pro de mi ne konataj problemoj?

Mi pensas, ke ne nur la membroj de ENA, al kiuj mi promesis informi ilin pri eventuala mendo, nun rajtas ricevi iom da novaĵoj pri la nuntempa elreviganta situacio. Mi eĉ scias, ke ankaŭ filatelistoj pretas aĉeti la ĝis nun "fantoman" medalon. Mi certas, ke vi mem pri nenio ŝuldas, male, ĉar vi eĉ defendis la projekton en la LKK, ĉu ne?

Esperante baldaŭ ricevi kelkajn klarigojn por informi nian legantaron, mi salutas vin, numismate kaj filateliste.

Bert Boon por Esperanto-Numismatika Asocio

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.09.2017 11:13

Estimata Clay Magalhaes,

Ekde kiam mi povos kontakti rete la LKK-n? Mi havas proponon por kunlabori, sed ne jam havas la retadreson. Dankon!

Bert Boon
Esperanto-Numismatika Asocio ENA

21.09.2017 16:06

Estimata s-ro Boon,

Dankon por via mesaĝo.

Vi povas fari la proponon al mi kaj, se ne estos necese konsulti LKK-on, mi povus tuj respondi al vi.

Sincere via,

Clay Magalhaes
KKS - UEA

22.09.2017 15:36

Estimata s-ro Magelhaes,

Dankon pro via afabla propono. Mi evidente, ne sciis ke ankaŭ vi estas LKK-ano de Lisbono kaj rajtas decidi pri interesaj proponoj al LKK. Mi petas pardonon!
Tamen, en mia propono temas pri speciala afero kaj tial mi serĉas kontakton kun la LKK-ano pri filatelaj kaj aliaj memoraĵoj kiuj estos eldonitaj okaze de la UK. Ĉu vi havas lian aŭ ŝian retadreson? Estus certe la malpli longa vojo, kiel mi sukcese spertis en Seulo. Dankon pro via kunlaboro!

Samideane kaj numismate,

Bert Boon

22.09.2017 16:05

Estimata s-ro Boon,

Dankon por via mesaĝo.

Jes, mi estas la ĉefa organizanto de la UK-oj. Fakte, ĉiuj decidoj rilate al la UK-oj devas esti faritaj de mi, aŭ en komplikaj kazoj, de la ĝenerala direktoro de UEA. LKK havas kiel taskon nur kunordigi la laboron, ili ne faras decidon. La Universalaj Kongresoj estas evento de UEA kaj ĉiuj varoj vendataj dum ĝi devas esti proponataj pere de la Libroservo de UEA. En la Duaj Bultenoj estas informo pri tio vendada regulo, bv. kontroli en la ekzemplero de la lilla UK.

Dankon por la komprenemo.

Sincere,

Clay Magalhães
KKS - UEA

22.09.2017 18:39

Estimata s-ro Magelhaes,

Dankon pro via klarigo, kiu metas mian proponon kaj vian taskon en alian lumon.

Jen do mia propono al UEA per vi kiel ĉefa organizanto. Mi sendas ĉiproponon kiel iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio (ekde 2012). Rilate al la forpaso de Marjorie Boulton kaj okaze de la UK 2018 mi petas en la nomo de ENA al vi kaj al UEA eldoni memormedalon kun unu flanko (ekzemple averse) honoriganta unu el la pli eminentaj esperantistoj kaj aliflanke (reverse) memoriganta la venontan UK-n en Lisbono. ENA pretas reklami en la asocia revuo pri tiu evento kaj ebleco mendi ĝin.

Mi samtiel proponis antaŭ la Kongreso al s-ro Kang, LKK-ano en Seulo, emisii medalon okaze de la ĉi-jara UK. Li respondis pozitive pri decido de LKK. Sekve mi mendis (du) 2

ekzemplerojn por mia propra kolekto kaj por povi priskribi la numismatikaĵon en la ENA-revuo. Vane koncerne la mendon, kvankam mi aŭdis de mia samideana amikino Elda Doerfler (ELF-AREK), ke vere medalo estis eldonita ĉar ŝi mem vidis ĝin...

Mi esperas, ke vi kaj UEA pozitive reagos, ĉar honora membro de UEA kiel M. Boulton sendube meritas esti honorigata ankaŭ tiel, ĉu ne? Krome UEA povas tiel kolekti necesan monon por sia agado.

Anticipe mi dankas pro konsidero de la propono de ENA.

Altestime,

Bert Boon
FD de UEA

22.09.2017   19:08

Estimata s-ro Boon,

Dankon por via mesaĝo kaj klarigo pri la afero. Mi konsultos prie en la oficejo kaj informos vin pri la nia respondo.

Sincere salutas kaj bondeziras por la semajnfino

Clay Magalhaes
KKS - UEA

25.09.2017   12:27

Estimata s-ro Boon,

Mi parolis kun miaj kolegoj en la oficejo kaj ni, bedaŭrinde, ne povas akcepti vian proponon ke ni eldonu medalon. UEA ne eldonas medalojn.
Fakte, ekster la kongresoj la vendo de tiu varo estas praktike nula.
Alia malhelpo por via propono estas, ke ni ne eldonis similaĵon por aliaj same gravaj homoj de nia movado kaj la 103-a UK ne havas iun apartan signifon por pravigi tiun eldonon.

Ni, la Libroservo, ja povus volonte vendi viajn medalojn, komisie dum la UK, se vi decidos mem eldoni ilin, do, UEA ne povas mem preni la riskon de tiu entrepeno, des malpli en la nuna financa situacio de la asocio.

Se vi interesiĝas pri la propono, bv. kontakti la libroserviston, s-ro Ionel Onet, por ricevi pliajn detalojn pri tiu kunlaboro. Lia retadresoestas: libroservo@co.uea.org

Sincere,

Clay Magalhaes
KKS – UEA

28.09.2017 14:44

Estimataj kaj kara samideano Ionel Onet,

Mia respondo estas por vi kaj viaj kolegoj.
Kial viaj argumentoj ne validas por filatelaĵoj, kiuj (tute prave) abundas dum ĉiu UK, ankaŭ se temis pri UK "kiu ne havas apartan signifon"? Ĉu UEA ekster la UK vendas multajn filatelaĵojn?
Rilate al la 103a: ĉu UK en la jaro de la datreveno de la zamenhofa forpaso kaj de forpaso de nia plej eminenta verkistino ne havas apartan signifon? Estas granda manko, ke UEA pasintece ne eldonis medalojn. Kial la centra (!) oficejo daŭrigu ne honori eminentulojn, kiuj vere ne abundas en la historio de Esperanto?

Kial ĉiam transdoni la iniciativon al privatuloj? Ĉu pro la financa risko? Se oni agas pere de mendilo kaj anticipa pago, la rezulto estas nur profito, ankaŭ por UEA. Kiel opinias la LKK de Lisbono pri mia propono? Ĉu ili laŭ demokrata principo ankaŭ havas voĉon pri tio en la UK kiun ili mem organizas? Kiu decidas pri filatelaĵoj?

Mi ne scias, ĉu vi scias ke antaŭ nur 4 jaroj unuafoje en nia historio estis fondita tute nova fakgrupo (Vidu Jarlibrojn!) kiu celas emfazi la rolon de esperanta numismatiko en la historio de nia lingvo, kaj ke la revuo (dume 15 numeroj, pli ol 350 paĝoj) estas sendata ankaŭ al UEA? Ĝis nun nur unu nuntempa eminentulo, estimata S-ro Renato Corsetti, reagis, gratulis kaj kuraĝigis la asocion, kiu jam varbis preskaŭ cent individuajn kaj asociajn membrojn, i.a. la Numismatikan Departementon de la universitato de Vieno? Ĉu vi vere pensas, ke ili malaprobas la proponon?

Kun samideanaj(?)salutoj,

Bert Boon
Por ENA

28.09.2017 17:43

Estimata s-ro Boon,

La suba mesaĝo ŝajnas esti celita por la s-ro Ionel Onet, sed vi sendis ĝin al mi. Se vi deziras kontakti s-ro Onet, bv. skribi al ,
libroservo@co.uea.org

Tamen, estas parto en via mesaĝo kiu rilatas al mia fako, nome, pri la rolo kaj decidopovo de LKK. Bv. konscii ke nur UEA estas tiu, kiu finance riskas ĉe ĉiuj UK-oj. Se ĝi estas profita, tiam UEA dividas la profiton kun la landa movado, sed, se la kongreso estas deficita, tiam nur UEA estas tiu, kiu respondecas pri la ŝuldoj. Tio signifas ke jes, UEA havas lastan vorton pri decidoj kiuj povus havi financajn konsekvencojn al la kongresoj. Ni havas multjarajn spertojn pri la kongresa publiko kaj ĝia aĉetintereso.

Sincere salutas,

Clay Magalhães
KKS - UEA

28.09.2017 18:29

Estimata s-ro Magelhaes,

La mesaĝo estis celita por ĉiuj kiuj esprimis sian opinion, do por vi kaj viaj kolegoj. Mi volis krome nur informi s-ron Onet, ne ĝeni lin, ĉar li klare ne havas decidpovon. Mi ankaŭ ne plu volas ĝeni vin, ĉar vi klare ne sentas bezonon respondi al miaj rimarkoj. La tunelperspektivo kaj pensmaniero ĉe la nuntempa UEA estas sufiĉe klaraj, almenaŭ al mi. Tamen, mi ne volas, ne rajtas deteni nian konversacion al la membraro de ENA. Mi preferas vitran domon,almenaŭ ĉe ENA.

Same sincere,

Bert Boon

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

10.09.2017 15:42

*Informcele*

Reage al mia teksto "*Esperanto aŭ lingva veturilo"* en kiu mi mencias ke laŭeble endus, neprus, multe pli kunlabori kun ne-E-istaj samfakuloj, mi ricevis i.a. tiun reagon de

*S-ro Joseph VAN DER VLEUGEL*

*Prezidanto de RADE / Rotaria Amikaro De Esperantistoj*

*"Pro kurigi Esperanton sur aliaj kuretoj mi kreis, kun aliaj esperantistaj rotarianoj, esperantan rotarian klubon (www.rotaryeclubesperanto.org). Nun ekzistas dua rotaria klubo kiu parolas Esperanton (**https://rotaryclubdeesperantobrasil.org/2017/04/23/6-a-renkonto-de-la-rotary-club-de-esperanto-brasil/**).*

*En 2000 mi membriĝis en la klubo de Louvain-la-Neuve (http://louvain-la-neuve.rotary2170.org/). Mi forlasis la klubon por krei la unuan rotarian klubon kiu parolas Esperanton. Rotarianoj povas konstati ke Esperanto bone rolas kiel universala lingvo inter rotarianoj el diversaj landoj. Konkludo: mi instigas esperantistojn membriĝi en unu el la du esperantistaj kluboj. Kiel membro de rotaria klubo oni rajtas viziti ĉiujn klubojn en la mondo, do certe najbaran klubon".*

Imitinda ekzemplo en aliaj medioj !

Germain Pirlot

10.09.2017 21:32

Kara Germain,

Mi tute konsentas kun vi kaj gratulas S-ron VAN DER VLEUGEL. Kiel numismato mi jam organizis ekspozicion pri esperanta numismatiko en neesperantista numismatika klubo en Herentals, prelegis pri Esperanto kaj esperantaj numismatikaĵoj en neesperantista klubo en

Tienen kaj prelegos en samspeca asocio en Diest je la fino de septembro. Espereble mi ricevos multajn aliajn invitojn de neesperantistaj kluboj!

Amike kaj numismate,
Bert Boon

11.09.2017 8:30

Kara Bert,
Dankon pro tiu informo kaj gratulegojn pro via agado en ne-E-istaj numismatikaj medioj!
Temas pri bonegaj ekzemploj de kunlaborado, kiujn e-istoj multigu pli kaj pli.
Kore,
Germain

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

13.09.2017 15:09

Kara amiko Hans,

Kiel vi fartas? Mi esperas ke vi estas en sufiĉe bona sanstato. Mia letero al vi estas ducela.

1. En via broŝuro "Esperantomono", dua eldono, mi legis: "La aŭtoro de tiu broŝuro posedas leteron kun tiaj valormarkoj. La letero estis forsendita en jaro 1909." Koncernas la valormarkojn de Bord kaj Tellini. Mia peto: ĉu vi povus sendi al mi perrete koloran kopion de tiu letero? En la venonta numero de ENA-revuo tiu dokumento povus ilustri artikolon.

2. Mi eventuale volus aĉeti de vi numismatikaĵojn de kiuj vi havas plurajn ekzemplerojn. Kompreneble se vi emus vendi tiajn objektojn el via kolekto.

Esperante ke miaj petoj ne ĝenas vin, mi kore antaŭdankas vin kaj evidente pretas rekompensi eventualajn kostojn.

Samideane kaj numismate,

Bert Boon/ iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio

16.09.2017 1:54

Kara amiko Bert,

Pri la letero de 1909 mi ne memoras. Dum mia transloĝiĝo al nova domo multe de miaj libroj perdiĝis, sed la Esperantaĵojn mi povis savi.
Mi sendos al vi liston de Esperanto-medaloj kiujn mi povas vendi.
Antaŭ monato en aŭkcia katalogo mi vidis foton de rusa medalo memoriga pri Ciolkovski kiu estis esperantisto kaj sciensisto pri aeronaŭtiko. Mi sendos al vi foton.

Salutojn de Hans Jankowski

16.09.2017 17:25

Kara Hans!

Dankon pro via respondo! Vi sendis (eble erare?) dufoje la saman retleteron. Mankis do la listo de esperantaĵoj kiujn vi povus vendi kaj la foto de la rusa medalo en la aŭkcio. Ĉu vi intencus proponi sumon por tiu medalo? Se ne, eble mi povus, se vi konsentus!

Kiam vi hazarde retrovus la leteron de 1909, kopio estus bonvena ĝis unu semajno antaŭ la fino de oktobro (tiam aperos la nova numero de ENA-revuo).

Fine kroma peto. Kiel vi opinias pri la revuo de ENA? Ne ĝenu diri kio ne plaĉas al vi. Ĉiuj viaj proponoj por plibonigi la enhavon aŭ plibeligi la aspekton estas ege bonvenaj. Mi anticipe kore dankas vin pro viaj subteno kaj kunlaboro! Vi estas la vera pioniro pri Esperanta Numismatiko! DANKON!

Se vi partoprenus en la UK de 2018 mi ŝatus revidi vin tie!

Amike kaj numismate

Bert

PS Ĉu vi ĝis nun bonorde ricevis ĉiujn numerojn de la ENA-revuo?

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.09.2017 16:36

Estimata sinjoro Tuider, Kara Bernhard!

Vi skribis al mi:

„La mezuroj de la objektoj estas notitaj en la datumbankoj, sed ili nur videblas en la katalogo „Trovanto“, ne en la katalogo „Bildarchiv Austria“. Ĉi-kune mi sendas al vi la ligilon, kiu gvidas al la katalogero de la kuna-monero: http://data.onb.ac.at/rec/baa12224592”

Temas pri ĉi-objekto:

Plaketo pri la unua kongreso de kroataj esperantistoj 1997



Provante diversfoje trovi la petitajn informojn (mezuroj, eldonkvanto, metalo, foto de reverso ktp) pri la ĉi-montrata plaketo (kiun mi trovis en Bildarchiv) mi unue uzis la de vi menciitan retan ligilon, sed ĝi nur gvidas min al la revuo de nia ENA (jarkolekto 4, n-ro 1) .Mi do ne bezonas informojn pri la (dumetala) monero, sed pri la unumetala

plaketo kun la sama aspekto. Bedaŭrinde mi ankaŭ ne sukcesas malfermi “Trovanto”-n, kie troviĝus kion mi serĉas.

Mia peto: bonvolu helpi min. Eble mia manko de sperto serĉi en Interreto malhelpas min havi rezulton. Mi intencas verki pri tio artikolo en la rubriko “Spikumaĵoj & suplementoj”.

Mi kore antaŭdankas vin kaj vin salutas,

amike kaj numismate.

Bert Boon por ENA-revuo

28.09.2017 9:05

Estimata kaj kara s-ro Bert Boon

Multan dankon pro via mesaĝo. Jes, vi tute pravas, la mezuroj nur estas videblaj en „Trovanto“, ne en „Bildarchiv Austria“. „Trovanto“ donas pli da informoj ol „Bildarchiv Austria“.

La ligilo, kiun vi notis, gvidas al la plaketo: http://data.onb.ac.at/rec/baa12224592

Se vi havas pluajn demandojn, ne hezitu sciigi nin!

Korajn salutojn kaj bondezirojn,
Bernhard Tuider

28.09.2017 9:54

Multan dankon!

Jes mi havas kelkajn pluajn demandojn. Ĉu vi povus konfirmi, ke la plaketo ne havas reversan bildon aŭ tekston (Bildarchiv ĝenerale montras nur unu flankon)?

Mankas al mi informoj pri la pezo en gramoj, la eldonkvanto kaj la (nomo de la) medalisto. *Ofte tiuj informoj estas malfacile haveblaj, do se vi trovos nenion, ne vere gravas*.

Dankon ankaŭ pro via aktuala informo pri la traserĉeblaj tekstoj en revuoj. Mi certe publikigos vian mesaĝon en la oktobra revuo. La plaketo ricevos lokon en la sama numero .

Samideane kaj numismate,

Bert Boon
ENA

28.09.2017 16:38

Kara Bert,

volonte, nedankinde!

La plaketo pezas 410 gramojn, ĝi ne havas reversan bildon aŭ tekston, reverse ĝi estas tute glata.

Mi supozas, ke la Kroata Esperanto-Ligo povus scii la informojn pri la eldonkvanto kaj pri la nomo de la medalisto.

Korajn salutojn,

Bernhard Tuider

28.09.2017 17:43

Kara Bernhard,

Multan dankon denove! Mi kontaktos Esperantan Dokumentan Centron en Kroatio!

Ĉu mi jam sciigis al vi, ke la Fakultato pri Numismatiko de Viena Universitato iĝis membro de ENA kaj ankaŭ konservas nian revuon por studentoj kaj profesoroj?

Amikajn kaj numismatajn salutojn!

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.09.2017 18:05

Estimata samideano Josip,

Mi petas vian helpon laŭ rekomendo de Bernhard Tuider de Esperato-Muzeo en Vieno.

Mi intencas fine de oktobro montri kaj priskribi en la revuo de ENA la PLAKETON (simila al la monero, sed nur unuflanka) kiun emisiis la kroataj esperantistoj okaze de la Unua Kongreso en 1997. Mi posedas kopion de ekzemplero el la bildarkivo de Vieno. La jenaj informoj ankoraŭ mankas al mi: kiom da ekzempleroj de la PLAKETO estis emisiitaj? Ĉu ĉiuj en la alojo kupronikela? Ĉu vi konas la nomon de la medalisto? Ĉu vi povus (ne urĝas!) havigi al mi foton de la medalisto kaj informojn pri lia artista kariero?

Mi jam anticipe tutkore dankas vin pro via helpo!

Samideane kaj numismate,

Bert Boon por Esperanto-Numismatika Asocio

28.09.2017   22:16

Kara samideano Bert,

Nur por trankviligi vin mi tuj skribas al vi. Mi volonte verkos specialan artikolon. Tamen, mi devas atentigi vin, ke ne temas pri plaketo, sed pri vera monero, kiu cirkulas en Kroatio. Mi havas ĉiujn informojn, sed mi bezonos iom da tempo por verki artikolon.

Amike,
J. Pleadin

29.09.2017   8:49

Kara samideano Bert,

Mi verkis mallongan artikolon pri la MONERO, sed pri la PLAKETO mi trovis neniajn indikojn. Povas esti, ke temas nur pri prov-ekzemplero de la monero, ĉar laŭ mia scio, PLAKETO neniam aperis oficiale.
***(… vidu la rubrikon "Spikumaĵoj kaj suplementoj" p.11***)
Kun amikaj salutoj,

J. Pleadin

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**_A N O N C O J_**

**_&_**

**_E V E N T O J_**

# NOVA ARĜENTA MONERO-MEDALO

# 100 STELOJ










**La monero aperis okaze de la 150a naskiĝdatreveno de René de Saussure (1868 – 1943).**

Li estis la inventinto de la universala mono.

Lia frato Ferdinand de Saussure estis pioniro de la moderna lingvistiko.

Limigita eldonkvanto: 1000. Ne okazos posta represado.

Maso: 1 unco da arĝento 999/1000 (31,1 gramoj). Oficiala atesto senkosta.

Pro la leĝa situacio en Aŭstrio la arĝentostampo estas 925.

Diametro: 37 mm. Surfaco: brila.

Liverado en originala plasta kapsulo de Münze Österreich AG (Moner-farejo Aŭstria AK).

Eldonisto: Mag. Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio.

Dezajnistoj: Mag. Walter Klag kaj Mag. Helmut Andexlinger, la ĉefgravuristo de Münze Österreich

Helmut Andexlinger gvidas ekde 2016 la gravuristan sekcion de Münze Österreich. En la aŭstria urbo Steyr li sukcese trapasis la gravuristan edukadon. Poste li studis komunikado-sciencon en la Viena Universitato. Unu el liaj plej grandaj sukcesoj estas la dezajno de la 2-eŭra monero 2012, kiu cirkulas en 17 landoj – li gajnis en konkurso kontraŭ 800 aliaj partoprenantoj.

Produktisto: Münze Österreich AG, Wien 3., Am Heumarkt 1,  muenzeoesterreich.at

Münze Österreich AG estas 100%a filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko.

Prezoj (validaj ĝis la 31a de januaro 2018) inkluzive la sendokostojn al ĉiuj Eŭropaj landoj:

| | |
|---|---|
| 1 monero | 59 € |
| 10 moneroj | 570 € |
| 100 moneroj | 5500 € |

Sendo al ekstereŭropaj landoj: + 6 € por unu mendo (por unu paketo).

Liverado post antaŭpago sur la konton de Mag. Walter Klag

IBAN:  AT06 2011 1000 3518 3799      BIC:  GIBA ATWW XXX

Bonvole skribu samtempe vian ekzaktan adreson (eventuale ankaŭ la numeron de la loĝejo) al

esperanto@chello.at .

Per la aĉeto vi subtenas la eldonon de pliaj moneroj. Ankaŭ donacoj bonvenas.

Se vi havas demandojn, bonvole skribu al esperanto@chello.at .

***Stelomoneroj uziĝas dum internaciaj aranĝoj. Tamen oni parolas ankaŭ pri medaloj aŭ pagomedaloj:  de.wikipedia.org/wiki/Stelo***

Moneroj kaj medaloj • Mag. Walter Klag • 1190 Wien/Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

* * * * * * * * *

Karaj kaj estimataj!

Ni ĝojas sciigi vin, ke la kompletaj tekstoj de la skanitaj periodaĵoj – pli ol 70 diversaj titoloj kun entute pli ol 900 jarkolektoj – estas sisteme traserĉeblaj laŭ unuopaj nocioj.

La traserĉo eblas pere de la retejo ANNO (AustriaN Newspapers Online): http://anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1

Korajn salutojn kaj bondezirojn,

Bernhard Tuider (Teamestro)
Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum
Österreichische Nationalbibliothek

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu plejeble regule dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 82 individuaj membroj kaj 19 esperantaj organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2017 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@s kynet.be!

## Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"